Konsilo al amatoroj {de USIKUBO 9p}

Kiam ajn mi kontaktas amatorojn, mi ĉiam sentas, ke ili ĉiuj avide volas plifortiĝi.
Ĉi tiu deziro estas senfina. Kiam vi atingos unu celon, vi baldaŭ vidos la sekvan. Eĉ TYOU Tikun {趙 治勲}volus plifortiĝi same.
Ĉi tio jam egalus senfinan inferon. Profesiuloj meritas iri al la infero, sed kial amatoroj ne pli ĝuas Goon?
Ne rapidu por progresi sed ĝuu Goon. Nur ĝuu sen zorgadi por venko. ...... Provu rigardi Goon kiel kulturon. Preterlasante deziron plifortiĝi, malrapide provu reludi la ludoregistrojn de HON-IN-BOU {本因坊} Syuuei {秀栄}. Estus bone havi tian tempon.
Mi estas Goa profesiulo, do mi ne povas simple ĝui Goon. Tiurilate mi envias amatorojn.
Homoj diras, “Ne ekzistas alia profesio tiel enviinda, pro ke vi povas pasigi vian tutan vivon sur la vojo, kiun vi amas.” Sed la vivo de Goa profesiulo tute ne estas tiel facila. Onidire, la statuso de Goaj profesiuloj draste pliboniĝis kompare kun la pasinteco. Ĉi tio certe estas vera entute. Tamen, la nombro de Goaj profesiuloj dekobliĝis en la lasta duon jarcento. Nur ĉirkaŭ 10% de profesiuloj povas vivteni nur per siaj matĉoj. La realo estas, ke la plimulto de Goaj profesiuloj vivtenas "malgraŭvole" per instruado de Goo.
La plej malfacila afero por profesiulo estas esti preterpasita de iu, kiu venas poste. Venas multaj talentaj kaj fortaj ludantoj plijunaj. Vi povas kompreni la doloron de esti preterpasita, nur se vi estas profesiulo.